

Adam Krieger,
La tago iris jam de
ni

tradukita de Wolfram Diestel

La tago iras jam de ni,
ne lumas plu la sun'.
Plorinte lacaĵ, ĉiuj ĉi
trankvile dormas nun.

.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....

En harmoni' vi dormas jam,
ho, kara belulin'.
Sed dum la nokt' sopira am'
iradi faras min.

Suspiro blovas, aŭdu ĝin,
tra la fenestr' al vi,
flustrante, ke vi ravis min,
kaj kiel fartas mi.

.....
.....
.....
.....

Vi bonan nokton havu nun,
sufer' kaj ĝu' de mi!
Post la apero de la sun'
komune estu ni!

...

Adam Krieger,
Nun venis de la tago
fin'

*tradukita de Manfredo Ra-
tislavo*

Nun venis de la tago fin',
Ne lumas plu la Sun',
Dumtage laciginte sin
La homoj dormas nun.

Nur mi, mi ĉirkaŭiras sen
Ripozo tie ĉi,
Ne trovas mi la kaŭzon jen
De la melankoli'

Mizeron mian vidas vi,
Sed vi ne helpas min,
Vi steloj alte super mi,
Mortigos min je l' fin'.

Ekdormis vi jam, belulin',
Trankvile kuŝas vi.
Malkvietigas io min,
Ĉirkaŭe iras mi.

Ekaŭdu la sopiron vi,
Ho kara sinjorin'!
Ĝi diras, kiel fartas mi,
Ke vi flamigis min.

Se estas vi la origin'
De tiu ĉi sufer',
Mi petas, ke vi helpu min.
Aĥ, faru ĝin en ver'!

Ripozu dum la nokto nun,
Permesu vi al mi,
Se ree lumos hela Sun',
Ke estu mi ĉe vi.

...

Adam Krieger,
Nun sich der Tag geen-
det hat

Nun sich der Tag geendet hat
Und keine Sonn' mehr scheint,
Schläft alles, was sich abgematt
Und was zuvor geweint.

Nur ich, ich gehe hin und her
Und suche, was mich quält,
Ich finde nichts als ungefähr,
Das was mich ganz entseelt.

Ihr Sterne hört zwar meine Not,
Ihr helft mir aber nicht,
Denn euer Einfluß macht mich tot
Und blendet mein Gesicht.

Du Schöne bist in Schlaf gebracht
Und liegst im stiller Ruh,
Ich aber geh die ganze Nacht
Und tu kein Auge zu.

Erhöre doch den Seufzerwind
Der durch die Fenster weht,
Er sagt dir, wie du mich entzünd't,
Und wie es mit mir steht.

Bist du der Ursprung meiner Pein,
So such' ich bei dir Rat,
Durch dich kann mir geholfen sein!
Ach, tu es in der Tat.

Indessen habe gute Nacht
Du meine Lust und Pein
O wenn du morgen aufgewacht,
So laß mich bei dir sein.

...

Traduko de la Germana poemo “Nun sich der Tag geendet hat” de ADAM KRIEGER (*1634-01-07 – †1666-06-30) en Esperanton de WOLFRAM DIESTEL (Volframo Distel’).

Arg-307-623 (2005-05-03 13:20:37)

Traduko de la Germana poemo “Nun sich der Tag geendet hat” de ADAM KRIEGER (*1634-01-07 – †1666-06-30) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2005-04.

MR-436-1 / Arg-307-622 (2013-01-31 12:16:30)

La melodio estas aŭdebla en <http://www.ingeb.org/spiritua/nunsichd.mid>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ADAM KRIEGER (*1634-01-07 – †1666-06-30), publikigita 1667.

Arg-307-620 (2013-01-31 13:26:43)

Pri la aŭtoro vidu: http://de.wikipedia.org/wiki/Adam_Krieger. La teksto de la unua strofo estas identa al la unua strofo de la kanto n-ro 478 de la germana evangelia kantlibro. La restaj strofoj de jena religia kanto estas verkitaj de Johann Friedrich Herzog (1647 - 1699), krome de la oka. La nereligia versio troveblas en <http://www.volksliederarchiv.de/text851.html>.